

Nur tiom chi
(*Csak ennyi...*)

En la rozlaubo sidas homo.
Chirkau li delfinio kreskas
kaj bluaj floroj de l' enciano.
Tie, en klara akvo
de ghardena lago
sian soifon estingas
birdo.
Regas silento,
sablerojn defaligas
la tempo,
venteto flirtigas
facilajn flugilojn
de papilioj.
Neniu promenas
en la ghardeno,
nur la homo sidas
en sia radsegħo senvorte,
desupre lin la rozlaubo kovras,
chirkau li bunta floraro,
kaj blua enciano....
tra sia animo
li filtras la silenton.....

....nur tiom chi.

Tradukita de János Ruff